



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 162

Oktobero, 1999

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto

Stevens Norvell — kompostisto

Geoffrey Greatrex — preskontrolisto

Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson

329 Poplar Drive

Dartmouth, Nova Scotia

KANADO B2W 4K8

bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:

Reni Porter

71 RidgeValley Road

Halifax, Nova Scotia

KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

Berlin: La Verda Urbo

La 84a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Berlino de la 31a de julio ĝis la 7a de aŭgusto, 1999. Pasintmonate mi priskribis la kongreson kaj promesis aldonan artikolon pri la urbo. Mi skribos ĝenerale laŭde pri Berlino, tamen mi havas devon averti la leganton, ke mi havas antaŭjuĝojn kiuj povus iom difekti mian kapablon pensi tute objektive pri la temo: Kiel respublikisto, mi ne multe interesiĝas pri reĝoj kaj imperiestroj, kaj kiel pacifisto, mi ne povas admiri la militistan lertecon de la prusoj kiuj konstruis la urbon. Kaj kiel homarano mi ne povas forpuŝi el la menso la hororajn krimojn truditaj al multaj popoloj pro ordonoj elsenditaj de tiu ĉi ĉefurbo antaŭ pli ol duonjarcento.

Unu el la plej gravaj trajtoj de Berlino estas la rivero Spree, kiu vagas kurbe tra la urbo. Ĉe la riverrandoj troviĝas jen verdaj ĝardenoj, jen parkoj kaj arbaroj, jen malnovaj kasteloj kaj preĝejoj el ŝtono, jen modernaj konstruaĵoj el ŝtalo, betono kaj vitro. Al mi, turista ŝipvojaĝo estis tute agrabla sperto en varma somera mateno. Estas ankaŭ kanaloj kaj lagoj, kaj oni povas imagi, ke la abundo da akvo iel kontribuas al la verdeco de la multaj parkoj kaj arbaretoj disvastiĝintaj tra la urbo.

Grava fakto pri Berlino estas ĝia terena grandeco (900 kvadrataj kilometroj). Kvankam la nombro da enloĝantoj (nur 3,3 milionoj) ne estas granda laŭ la normoj de grandaj urboj de la mondo, teritorie Berlino estas unu el la plej grandaj ĉefurboj.

daŭras →

daŭrigata ⇒

La kialo estas, ke la urbo kreskis per enkorpiĝo de multaj ĉirkaŭaj vilaĝoj, ĉiu aparta de la aliaj je kelkaj kilometroj. Kvankam oni konstruis bonajn vojojn kaj fervojojn al kaj inter la novaj partoj de la urbo, oni ofte lasis la spacojn inter la vilaĝoj por resti parkoj, eĉ arbaroj. Unu arbaro, Grünewald, havas areon de 30 kv. km.

Tamen, la verdejoj estas aferoj ne nur de hazardo, sed ankaŭ de volo. „Tiergarten”, arbaro en okcidenta Berlino, fortranĉiĝis por provizi brul-lignon kaj krei legomĝardenojn en la tempo de postmilita malsato (1945). Poste la berlinanoj replantis la arbojn kaj denove agrabla arbaro ekzistas meze de la urbo.



Je la fino de la dua mondmilito 60% de Berlino estis detruitaj de bomboj kaj obusoj. Oni povas ankoraŭ vidi jen kaj jen restaĵojn de detruitaj konstruaĵoj, sed la plejparto en la okcidenta parto estas jam rekonstruita. La plej alta terpunkto en Berlino estas artefarita monteto kreita el amaso da rubaĵo (en Grunewald) el miloj de bombdetruitaj domoj kaj aliaj konstruaĵoj.

Sed nuntempe Berlino estas ankoraŭ la plej granda loko de nova konstruado en Eŭropo. Ĉar Berlino estas tuj iĝonta denove la ĉefurbo de Germanio, estas granda enmigrado de registaraj funkciuloj kaj komerculoj kun familioj kaj bezono konstrui ne nur novajn domojn sed ankaŭ konstruaĵojn por registaraj departementoj, ambasadoj, butikoj, ktp. Tamen, aldone al tio estas la fakto ke en orienta Berlino, antaŭ la falo de la muro (1989) oni rekonstruis malmulte. Nuntempe oni strebas regajni perditan tempon. Ekzemple, en Potsdamer Platz oni nun konstruas gigantan (67.000 m²) komercan, loĝejan kaj distran centron kun oficejoj, apartamentejoj, butikoj, restoracioj kaj kulturaj instalejoj. Mi vizitis tiun lokon, kaj neniam en mia vivo vidis tiom da konstrugruoj.


Mi vizitis la faman komunik-turon en Alexander Platz, en la antaŭe orienta parto de Berlino. La komunistoj konstruis ĝin ne nur por kapti kaj sendi televidajn signalojn, sed ankaŭ por montri al la mondo ke ili ankaŭ povas konstrui ion mirigindan. La turo estas videbla de preskaŭ ĉie en Berlino, kaj de la observejo oni bone rigardas super la urbo en ĉiu direkto.

Malgraŭ la distancoj inter diversaj kvartaloj de Berlino, transportado estas rapida kaj efika. Estas aŭtobusoj, U-Bahn (subtera fervojo), S-Bahn (rapidaj trajnoj), kaj ĉio funkcias oportune kaj akurate.

Estas multaj muzeoj kaj kelkajn oni ankoraŭ rekonstruas. Estas insulo en la rivero Spree kiu nomiĝas „Museumsinsel” (Muzeo-insulo). Inter la muzeoj tie estas la mondkonata „Pergamonmuseum” (Pergama Muzeo) kie troviĝas granda kvanto da helenaj artefaktoj, inter ili la impona altaro de Zeŭso, kiu plenigas grandan ĉambron. La multaj lerte faritaj statuoj, bustoj, reliefaĵoj, vazoj, ktp venis de Pergamo, antikva urbo en Malgranda Azio.

daŭras ⇒

daŭrigata →



La plej konata strukturo en Berlino estas la „Brandenburger Tor” (Pordego de Brandenburg). Iom simila al la Triumfa Arko en Parizo, la Pordego konsistas el giganta arkitravo kiu kuŝas sur la kapituloj de ses enormaj kolonaspektaj muroj. Aŭtomobiloj facile veturas inter la muroj. Ĉe la supro de la konstruaĵo flugilhava soldato, tenanta legian standardon, staras en roma batalĉaro tirita de kvar ĉevaloj, kiuj galopas ĉiam orienten.

Oriente de la Pordego de Brandenburg estas la fama strato, “Unter den Linden” (Sub la Tilioj). La larĝa aleo, kun ruband-parko (kun tilioj)

en la mezo, estas loko de grandaj butikoj. La respondo de okcidenta Berlino al Unter den Linden estas la Kurfürstendamm (Aleo de la Princo), bela strato ankaŭ kun meza ruband-parko kaj arboj. La butikoj estas luksaj kaj la prezoj estas responde altaj — bona loko por riĉuloj kiuj deziras fariĝi malpli riĉaj.

Fama orientilo en Berlino estas la Siegessäule (Kolono de Triumfo) por celebri la triumfojn de Prusio inter 1864 kaj 1871. Super la kolono estas junulino kun alto de naŭ metroj kaj kiu pezas 37 tunojn. La skulptisto uzis sian propran filinon kiel modelo. Komence la statuo estis nuda, sed la Imperiestro Wilhelm II ordonis vestojn!

Mi volas diri ion pri la Berlinanoj mem. Mi atendis arogantajn, severajn prusojn, sed la afero estis tute mala. La Berlinanoj ŝatas sidi en trotuara kafejo, trinki bieron, kaj ŝerci same kiel aliaj homoj. Kiam mi perdis la vojon (sufiĉe ofta evento), mi ĉiam ricevis helpon de amikemaj homoj kiuj eĉ toleris mian laman uzon de la germana. Kaj mi devas ankaŭ pripensi pri la membroj de la Loka Kongresa Komitato, ĉiuj germanoj, kiuj multe laboris cele krei por ni belan kaj agrablan Universalan Kongreson. Mi vere kredas, ke okcidenta Eŭropo eniris novan epokon kaj ke la germanoj estas plene sindediĉaj partoprenantoj en la nova mondo kie la militoj kaj persekutoj estos nur koŝmaro el la fora pasintaĵo.

— Steĉjo

PAPILIAJ PENSOJ

Dum varma postsomera posttagmezo mi ekvidas preterpasantan oranĝkoloran monarkan papilion, kiu moviĝas kelkajn metrojn pli alten por eviti min, kaj mi pensas pri la foja malprecizeco de esprimoj, eĉ en nia internacia lingvo. Pensu pri papilio, kaj plej ofte vi imagas flirtantan insekton kiu delikate kaj kaprice flugetas, kiu senpeze moviĝas tien kaj reen laŭ la vento. En nia lingvo, tiun bildon oni ekspluatas per metaforaj esprimoj. En la *Plena Ilustrita Vortaro* oni priskribas la

daŭras →

daŭrigata ⇒

komunuzan sencon de „papilia (neserioza kaj malkonstanta) amo”, kaj kiel oni povas „papilie (senatente) tralegi libron” aŭ agi “senpripense, kiel papilio”. Papiliumi signifas „flirti, ĉirkaŭvagi, kiel papilio”.

Antaŭ ol tro ofte akcepti senpripense tiajn esprimojn, oni devus pli atente observi la agadojn de papilioj. Papilio certe estas delikata, senpeza estaĵo kiu flirtas en la aero. Tamen, la raso de monarka papilio kiun mi ĵus vidis ĉiun aŭtunon migras amase de Kanado al precizaj arbaraj lokoj en Meksikio, kaj revenas ĉiun printempon. Papilioj flugas diversmaniere, depende de siaj raso kaj intencoj. Grandaj papilioj kiel la monarka povas alte glisi dum multaj kilometroj. Etaj papilioj ofte ŝajnas zigzagi preskaŭ senkiale, kaj oni povas nur miri ke ili ne sentas kapturnon. Tamen, ili ĉiam antaŭeniras laŭ siaj intencaj direktoj dum ili evitas minacojn. La tiel-nomataj angul-flugilaj papilioj (kiujn mi unue konis erare kiel anĝel-flugilaj) rapide furiozas tra kampoj, kaj kelkaj papilioj impetas de la flankoj de kamparaj stratoj por ŝajne ataki aŭtomobilojn kiuj invadas iliajn teritoriojn. Virseksaj papilioj serĉas tra la kampoj por trovi inan papilion per sia allogaodoro, kaj konkurantoj foje batalas inter si por la rajto gravedigi la inon. Inoj elserĉas la ĝustajn plantojn por demeti siajn ovojn. Papilioj ŝajnas esti timidaj; ili vigle evitas kontakton kun minacoj kiel homoj. Mi devas konfesi ke, kiel juna ĉasisto de papilioj, mi povis atesti kiel malfacile estis kapti papilion kiu jam vidis kaj rekonis vin kiel minaco. Papilio havas multajn minacojn. Unu el ĝiaj defendoj estas la diverskoloraj skvametoj, subtilaj kiel polvo, kiuj belege kovras la kvar flugilojn kaj utilas por ebligi eskapon de araneaĵo. Efektive, krom la foja konkurado inter viraj papilioj, mi ne scias pri iu ajn papilio kiu minacas aŭ ĉasas aliajn animalojn. „Flirtu kiel papilio, piku kiel abelo!” diris la fama boksisto. Raŭpoj, la larvoj de papilioj, povas damaĝi vegetalojn aŭ arbojn sed papilioj mem estas inter la plej pacemaj estaĵoj en la mondo, kaj la plej belaj. Kiel belega estas, ekzemple, la tigro-kolora papiliono kiu brilas antaŭ printempaj folioj.

Post iom da observado, oni devas agnoski la fakton ke papilio ne estas senpripensa, senatenta, neserioza kaj malkonstanta estaĵo. Ĝi uzas siajn flugilojn kiom eble plej bone por plenumi siajn necesojn, kaj ĝi estas kapabla kaj lerta fluganto. Pensante pri batalantaj virseksaj papilioj, mi opinias ke esprimon kiel „papilia amo” oni facile povas miskompreni. Kion vi opinias? Ĉu vi jam rimarkis aliajn malprecizajn esprimojn en nia lingvo?

— Bob

